

Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo

ĵaŭdon la 26-an de novembro 2020 per Zoom

(aprobata en la interkonsiliĝo la 7-an de januaro 2021)

Ĉeestis

Claude Rouget, Amelie Matt kaj Mario Machlik (Tromsø)

Herman Ranæs kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen (Trondheim)

Bård Hekland (Bergen)

Lars Sandbakk (Stavanger)

0. Tagordo

La tagordo estis dissendita la 22-an de novembro. La tagordo aprobiĝis.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 22-an de oktobro

La malneta protokolo estis dissendita la 25-an de oktobro. La protokolo aprobiĝis kun kelkaj etaj korektoj.

2. Ekonomio

Laŭ la nuna superrigardo, estos eta malprofito de kelkaj miloj da kronoj en 2020.

Claude estis stariginta kelkajn demandojn en retmesaĝo la 18-an de novembro. **Decidoj:** Nur la kluboj kiuj sendis jarraporton ricevu monon. Ili ricevu 25% de la kotizoj, laŭ antaŭa decido de la landa kunveno. NJE ricevu la saman sumon kiel pasintjare (NOK 2 500). En la venontjara landa kunveno, ni fiksu procentaĵon surbaze de membrocifero por baza subvencio. Aldone, NJE eventuale povos peti subtenon por konkretaj projektoj.

Lars estis sendinta pr. 5 kilogramojn da libroj postlasitaj de Anne Karin al Kongo. **Decido:** NEL kovros la afrankon, Lars sendu la fakturon al Claude por repago.

Norvega Esperantisto: Venis propono de Douglas retmesaĝe la 23-an de novembro pri redukto de la aperritmo de NE-isto. La kialo estas parte la altigitaj afrankaj kostoj, parte ke mankas taŭgaj materialoj por tiom ofta revuo. **Decido:** NEL lasas al la redaktoro decidi, ĉu estu 6, 5 aŭ 4 numeroj jare. La estraro subtenas la proponon de la redaktoro redukti la aperritmon. NEL provos investi niajn fortojn en iom pli da aktivado en nia reta hejmpaĝo kaj en retaj komunumoj (Facebook, Twitter k.s.) kaj provos konvinki pli da membroj aliĝi al nel-inform.

3. Seminario 2020, pritakso

La seminario okazis sabaton la 21-an de novembro inter la 15-a kaj 17-a. Estis 37 partoprenantoj, du triono de la nordiaj landoj. Triono de la partoprenantoj restis poste por duonhora neformala diskuto.

Poste estis dissendita enketo, kiun respondis 22 ĉeestintoj. Ili pozitive taksis kaj la enhavon kaj la teĥnikan prizorgadon. Venis diversaj konsiloj kaj proponoj pri estonta agado.

La partoprenintaj estraranoj ankaŭ kontentas pri la aranĝo. Nun gravas kion plue fari.

4. Nordia kunlaboro

Decido: Ni daŭrigu per regulaj, ne tre oftaj retaj seminarioj, kunlabore kun niaj najbarlandaj asocioj. Estu iu ekstera gasto kaj iu programo, sed ne nepre primovada. Aldone al la ĉefa temo estu "rubriko" dum kiu oni informu pri okazint- kaj okazontaĵoj kaj diskutu praktikan kunlaboron. Inter aktualaj gastoj estis menciitaj Klara Ertl, Ragnar Baldursson, Charlotte Scherping Larsson.

Bård trairos la komentojn de la seminarioj partoprenintoj kaj faros iuspecan resumon. Kiam ni scios, kio estos sekva paŝo, ni dissendos informojn al la partoprenintoj.

5. Landa kongreso 2021

Ni diskutis diversajn eblecojn post la prokrasto de la skandinavia kongreso ĝis 2022. **Decido:** La norvega kongreso 2021 okazos rete en semajnfino fine de la printempo. La datojn ni fiksos en la sekva estrara kunsido. Ĝi estu dutaga, kun maksimume po tri horoj da programo. En 2022 ni kunorganizos la skandinavian kongreson kaj en 2023 ni planas fari surlokan landan kongreson en Oslo.

La estraro konsideros, ĉu aktualos aranĝi iun alispecan fizikan aranĝon sen formala landa kunveno aŭ komunan partoprenon en eksterlanda aranĝo ene de la sekvaj jaroj.

6. Eventuaĵoj

En 2009 estis starigita Facebook-konto de NEL, sed ĝi neniam estis ofte uzata. Kelkfoje afiŝas tie mesaĝojn Ulf Lunde. La estraro volas, ke minimume unu estrarano havu redaktan rajton kaj ke eventuale aliaj redaktantoj estu formale komisiitoj de NEL. **Decido:** Bård kontaktos Ulf kaj petos redaktan rajton. Ni provos aktivigi la konton.

Ankaŭ estis menciita konto en Twitter sub la nomo Esperanto-Nytt. Ĝin redaktas i.a. Jardar, sed ne estas oftaj afiŝoj. Ankau tiu ĉi povus esti iom aktivigita.

La interkonsiliĝo daŭris de 20:30 ĝis 22:00.

La venonta interkonsiliĝo okazos ĵaŭde la 7-an de januaro 2021 je 20:30 per Zoom.

Protokolis Bård Hekland